


Eŭropa Bulteno

septembro 2006, № 8 (50)

De la redakcio...



Karaj gelegantoj,

Post ferioj nia regula eldono, nun fin-fine, aperas komence de la monato.

En la UK-eldono de Eŭropa Bulteno okazis eraro en reta adreso de venontjara EEU kongreso, kiu okazos en Maribor, Slovenio. Korekta adreso estas www.esperanto-maribor.si kaj mi pardonpetas pro via ebla netrovo de nia paĝaro. Bonvolu viziti ĝin!

Agrablan legadon!

Vesna Obradović

EŬROPA TAGO DE LINGVOJ - KIAL ESPERANTISTOJ DEVAS PARTOPRENI

Karaj eŭropaj esperantistoj, mi estas konata kiel la plej maleŭropa eŭropano, do, se mi diras al vi, ke vi devas partopreni la agadojn de la Eŭropa Tago de Lingvoj, vi povas fidi min.

Esperanto estos pli multe konsiderata en Bruselo (kaj tion vi deziras, ĉu ne?), nur se Esperanto estos pli konsiderata en la unuopaj landoj de EU. Politikistoj kaj funkciuloj en Bruselo reagas nur al ripetataj atentigoj fare de la civitanoj. Se la civitanoj lernas amase la anglan, ili diras: "Nu, kion ni povas fari. Ĉiuj lernas la anglan. Ni nur povas uzi nur ĝin."

Se la civitanoj montros, ke okaze de la lingvo-tago ĉie en Eŭropo estas agado por Esperanto, ili komencos reagi alimaniere. Tiam Esperanto vere iĝos eŭropa lingvo. Indas montri tiun agadon nun, kiam ni havas kelkajn bonajn diplomatajn reprezentantoj de Esperanto en Bruselo.

Kion vi devas fari? Faru tion, kion vi volas kaj povas fari. Formalaj solenaj kunvenoj kun profesoroj kaj fakuloj estas bona, sed ili nepre estu tedaj kaj kun longaj paroladoj, ĉar tiaj ili devas esti. Lingvofestivaloj malTEDAJ kaj amuzaj ankaŭ estas bonvenaj. Disdonado de flugfolioj en trafik-plenaj stratoj estas la plej facile aranĝebla evento. Intervjuo kun televido aŭ radio landa aŭ loka estas tre bona. Artikolo en gazeto, kiun amika ĵurnalisto konsentas aperi, estas tradicia sed tre bona agado (donu la retan adreson por trovi Esperanto-kurson).

Unuvorte faru ĉion, kion vi farus por "ago-tago". Ĉi tiu estu la eŭropa ago-tago.

Renato Corsetti

HEJMPAĜO DE EEU PLENIGATA



Verŝajne kelkaj el legantoj de EB jam vizitis nian novan, oficialan EEU-paĝaron www.europo.eu. Post la somero ĝi fin-fine estas plenigata per la bezonata enhavo. Ni daŭre plibonigados ĝin kaj almetados ĉiujn necesajn materialojn, kiuj tuŝas nian agadon por Esperanto en Eŭropo. Por tiu tasko ni same petas vian helpon: ni bonvenigos viajn ideojn, konsilojn,

proponojn, kiel fari la paĝaron pli interesa kaj alloga al vi – ĝiaj uzantoj.

Same vi povas rekte kontribui al ĝi, rekte per kelkaj aferoj:

Unu estas fotogalerio – en kiun ni volas meti taŭgajn fotojn de eŭropaj Esperanto aranĝoj – okazigitaj far vi en via lando. Se vi do havas fotojn, kiujn vi opinias ke indas aperigi ĉe nia paĝaro, sendu ilin (aŭ sendu ligilon, se ili jam troviĝas ie rete) kun mallonga priskribo pri la aranĝo, kaj ni volonte aperigos ilin.

Due vi mem povas kontribui al menuo „Diskriminaciaj faktoj“ – kiu estas ĝuste loko, kie ĉiu el vi povas aperigi informojn pri la „lingva diskriminado“ – se vi ekscios pri tiaj ekz. en via lando, urbo, laboro...

Trie ekzistas „Forumo“, en kiu vi povas pridiskuti aferojn, rilataj al EEU.

Ni ĝojos se vi kontribuos al ajna (aŭ eĉ al ĉiuj) el la menu-eroj de nia-via nova paĝaro.

Peter Baláz

RAPORTETO PRI LA PROJEKTO AKEL

Enkadre de Eŭropa Esperanto Unio, estiĝis projekto AKEL – Alternativa Komunikado inter Eŭropaj Lernejoj. Lanĉita je la jaro 2003, ĝi kreiĝis por pliprofundigi eŭropcivitancon per la internacia lingvo Esperanto.

La projekto kunligas tri aŭ pli da lernejoj de malsamaj landoj en Eŭropo kaj interligas ilin ĉu per interretaj rimedoj ĉu per viv-ĉeesto.

Por helpi projektajn celojn oni kutime kandidatiĝas al subteno de programo Socrates, dum la monato de januaro. La programo Socrates de Eŭropa Unio celas apogi projektojn por Eŭropo.

Dum la lerneja jaro 2003/04, tri lernejoj el Pollando, Hispanio kaj Portugalio starigis la unuan version de AKEL. Unue ili ne sukcesis obteni Socrates-apogon. Tio nur okazis jaron 2004/05. Tio ebligis akel-lernejanojn de tiuj lernejoj intervizi kaj interkontakti per retaj rimedoj. Kreiĝis la AKEL-portalo, kiu nun funkcias ĉe lingvo.org/akel.

Dum la jaro 2005/06, aperis nova akel-grupo, nomita AKEL-2, kunliginte lernejojn de Bulgario, Italio kaj Britio, krom tiu unua AKEL, ĉi-foje kun litova lernejo anstataŭante la polan lernejon.

Por la jaro 2006/07, la du akel-grupoj kandidatiĝis denove al programo Socrates. Fakte oni devas tion fari ĉiun jaron. Ĉi-foje aldonante novajn lernejojn de Rumanio, Francio kaj Hispanio.

Pli da informoj pri la projekto ĉe lingvo.org/akel

Raportis Luís Ladeira

62-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO EN SARAJEVO




En Sarajevo okazis inter la 6a kaj la 13a de aŭgusto 2006 la 62a IJK kun 420 gejunuloj el pli ol 40 landoj. Ĉeestis skipo de EEU (Zlatko Tišljar kaj Andrej Naterer), kiu filmis interesajn okazaĵojn kaj aron da intervjuoj por la planata DVD-filmo »Kia povus esti Eŭropo«. Ni sukcesis akiri kvalitan kaj interesan materialon.



Zlatko Tišljar ankaŭ prelegis antaŭ kvardeko da aŭsuktantoj pri la temo »Kion Eŭropo povus lerni pri lingva politiko el la kazo de eksa Jugoslavio«.

Zlatko Tišljar



DVD PRI ESPERANTO POR EU-PARLAMENTANOJ – DE EEU KAJ DANK’AL S-RO MIJOŜI



Komence de oktobro estos transdonitaj DVDj „Esperanto Elektronike“ al ĉiuj EU-parlamentanoj nome de EEU, okaze de la „Eŭropa tago de lingvoj“ – la 26a de septembro (pro fakto, ke la parlamentanoj estos dum tiu tago kaj semajno en Strasburgo, ili ricevos la DVDn tuj ontan semajnon, kiam ili eklaboros en Bruselo).


La donacado de la DVDj povos okazi dank’al malavara helpo de s-ro Ecuo Mijoŝi, kiu financis la mendon de 750 DVDj – kio estis fakte dua plej granda mendo de tiu ĉi verko entute. (Plej grandan mendon faris francaj esperantistoj kun 3000 ekz., post EEU sekvis Litova Esperanto-Asocio kaj Kataluna Esperanto Junularo kun 500 ekz.).

La DVD estis farita en 9000 ekzempleroj – tamen jam post nur unu monato ĝi forvendiĝis!

Ankaŭ tio montras ke Esperantistoj jam konsciiĝas pri la neceso kaj bezono prezenti Esperanton al ekstera publiko per modernaj rimedoj – indaj je 21a jarcento.

La enhavo de la DVD estas buntega, pli pri ĝi eblas legi ĉe la hejmpaĝo de la projekto: www.esperantodvd.net.

La kreintoj de la DVD (junulara organizo E@I, kies kunordiganto Peter Baláž estas same estrarano de EEU) nun lanĉas re-preson de la verko – kaj ebligas al Landaj Asocioj kaj unuopuloj, kiuj preterpasis mendi la DVDjn dum la unua periodo, antaŭmendi ĝis fino de septembro kaj tiel eluzi la eblon ricevi ĝin kontraŭ bona prezo de nur 2,- EUR/peco – por ke oni povu tuj komence de oktobro ekhavi novan stokon de la DVDj. La prezo validas por antaŭmendoj ekde 50 ekzempleroj – kondiĉe ke almenaŭ duono de la sumo (do minimume 1EUR/peco) estos antaŭpagita (la plej konvena estas pago al UEA-konto **eĉi-v**). Pli da informoj ĉe: www.esperantodvd.net, aŭ kontaktu: dvd@ikso.net.



Peter Baláž

Pri nia kongreso...**AKCEPTO ĈE LA VICPREZIDANTO DE SLOVENA PARLAMENTO**

La 11-an de julio 2006 la vicprezidanto de la parlamento de Slovenio doktoro Marko Pavliha akceptis min kaj Vesna Obradović (kiel prezidanton kaj sekretarion de la EEU-kongreso en 2007 en Maribor) en sia sidejo en la parlamentejo en Ljubljana. Ni havis tre fruktodonan unuhoran interparolon. Mi prezentis al li baze nian EEU-strategion kaj la deziron ke li estu membro de la honora Komitato, per kiu ni ŝatus atingi du celojn:

instigi slovenan registaron fari ion por esperanto en 2008, kiam Slovenio prezidos EU-on kaj helpi finance la kongreson. Surprize li esprimis sian plenan subtenon kaj akceptis esti membro de la Honora komitato. Li deklaris ke lia malnova amiko estas Tomaž Longyka (la nuna prezidanto de Slovenia E-Ligo) kaj ke li ne nur konas bazajn ideojn pri Esperanto sed ankaŭ estas konvinkita ke tio estas vere afero por kiu necesas ion fari.

Li konkrete proponis ke li aranĝos kunsidon kun la registarprezidanto Janez Janša en aŭxtuno kaj ke li estas konvinkita, ke ankaŭ Janša komprenos ke temas pri ŝanco por Slovenio. Li petis ke ni tuj verku leteron en kiu ni proponu kunvenon kun la registarprezidanto, kiun subskribu la prezidantino de la honora komitato Margareta Handzlik. Ni intertempe preparis la leteron kaj Margareta subskribis ĝin. Doktoro Pavliha diris ke tiun leteron porinforme ni sendos al eŭropa komisionano Janez Potočnik (scienco) kaj al ĉiuj slovenaj EU-parlamentanoj kaj poste petos ilin subteni la kongreson kaj akcepti membrecon en la honora komitato.

Krome li mem gvidas komitaton de la parlemanto pri universitatoj de mediteraneaj landoj (35 landoj) kaj li planis proponi la uzon de Esperanto en tiu institucio. Mi diris ke ni ne ankoraŭ precize decidis kion proponi al la slovena registaro por 2008. Li diris ke ni pripensu plurajn eblojn kaj proponu ilin por diskuto en aŭtuno.

Li informis nin ke en Vieno aktivas doktoro Jernej Sekulec (sloveno), kiu estas ĝenerala sekretario de Komisiono de UNO por la internacia komerca juro (UNCITRAR) kaj kiu estas entuzisma esperanto-subtenanto, kiun ni kontaktu.

Zlatko Tišljar

KONGRESAJ NOVAĴOJ

Nia paĝaro www.esperanto-maribor.si dum nelonga tempo post UK en Florenco estis multfoje vizitita kaj ĝis nun ĝi estis rigardita pli ol 3200 foje. Rigardu ĝin ankaŭ vi .

Kadre de la kongreso okazos ankaŭ Infana kongreseto. Infanoj estos lokiĝitaj sur Pohorje, montaro en belega montkabano je 1400 m, en la fama skicentro Kope. Ĝustajn informojn ni anoncos ĝis fino de septembro.

Ĝis la fino de la jaro gejunuloj povas aliĝi al la kongreso sen kotizoj. Ne preterlasu la eblecon. Por detalaj informoj trarigardu la menciitan paĝaron.

Ni invitas fakulojn pri akvo, ekologio, ornitologio, natursciencoj, scienca esperanta terminologio kaj aliaj, kiuj volus kaj povus prelegi dum la kongreso skribi al eeu.kongreso@gmail.com . Via helpo estas bonvena.

Ĉiuj kiuj volas ĉeesti kiel helpantoj dum la kongreso bonvolu skribi al eeu.kongreso@gmail.com kaj priskribi kiamaniere vi povus kaj volus helpi. Helpantoj estas bezonataj kiel deĵorantoj je inform-punkto kaj en infana vartejo kiu funkcios dum la kongreso.

Vesna Obradović

ASEMBLEO DE EEU KUNVENIS EN FLORENCO

Dum la UK en Florenco kunvenis la Asembleo de EEU dufoje. Dum la unua fermita kunveno partoprenis asembleanoj el 18 EU-landoj kaj pritraktis ĉiujn punktojn de la tagordo. Oni akceptis raportojn kaj planojn por la periodo 2006-2007. Tiu ĉi apogiĝas al la ŝanco kiun Esperanto havas en sekvaj 3 jaroj en EU: En 2007 okazas EEU-kongreso en Slovenio, kiu prezidos EUn en la unua duono de 2008. Samtempe Margareta Handzlik estas EU-parlamentano kaj aro da diplomatoj esperantistoj laboras en Bruselo.

La dua parto okazis vendredon kaj estis malfermita. Partoprenis ĉirkaŭ 250 kongresanoj. La estraro mallonge raportis pri siaj laboro kaj planoj. Estis multaj diversaj rimarkoj de la kongresanoj rilate la agadon en EU. Plej multaj laŭdis la ĝisnunan laboron de EEU. Kelkaj petis aperigon de EEU-bulteno ankaŭ en papera formo.

La kongreson vizitis mardon EU-parlamentano el Pollando, sinjoro Marek Czarnecki, kiun tra la kongresaj salonoj gvidis kaj prezentis al li diversajn agadojn, la estraranoj de EEU Sean O Riain kaj Georgo Handzlik. La parlamentano estis tre kontenta, vidinte la aktivan uzon de Esperanto far tiom da homoj en tre diversaj agadsferoj.

EEU gvidis ankaŭ apartan Eŭropan Forumon en kiu oni unue prezentis du strategiajn vojojn por Esperanto en Eŭropo. La unuan prezentis profesoro Helmar Frank nome de Eŭropa Klubo (Sistema dulingveco) kaj la duan prezentis Sean O Riain kaj Zlatko Tišljár (egalrajta multlingveco sub komuna neutrala lingvo). Partoprenis ĉirkaŭ 60 kongresanoj. Poste okazis diskuto en kiu pluraj esperantistoj kritikis la ideon pri Esperanto kiel identeca eŭropa lingvo, opiniante ke Esperanto devas resti monda lingvo.

La estraro de EEU havis du kunvenojn kaj traktis ununuran punkton: kion proponi al la slovena registaro en aŭtuno ĉi-jare, kiam okazos kunveno inter honora komitato de la EEU-kongreso frunte kun Margareta Handzlik kaj la Ĉefministro de Slovenio. Pro tio ke ne eblas proponi ion en eduka sfero, ĉar EU ne havas rajton je tiu kampo enkonduki leĝojn, oni fine konkludis, ke estus plej bone proponi ion, kio ebligus al Esperantaj eŭropaj neregistaraj organizoj regule ricevi monon por sia funkciado. Tiusence nia propono estos la peto starigi apartan novan fondaĵon ĉe EU.

Se vi volas trarigardi la Protokolon de la Asembleo de EEU en UK en Florenco - ambaŭ formatoj .doc kaj .pdf estas ĉe: <http://www.europo.eu/index.php?art=1&art2=6>

Zlatko Tišljár

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 3-an de septembro 2006.

Redaktorino: Vesna Obradović.

En la numero kunlaboris: Renato Corsetti, Zlatko Tišljár, Peter Baláž, Luís Ladeira kaj Vesna Obradović.

Leterojn kaj komentojn sendu al la sekretario de EEU: zlatko.tisljar@azm-lu.si

Kontaktoj: komunikadcentro@esperanto.org kaj vesna.obradovic@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.lingvo.org>